

Hugo von Hofmannsthal,  
Ambaŭ

*tradukita de Manfred Retzlaff*

La vin-pokalon portis ŝi  
- Al ŝia buŝ' similis ĝi -  
Ŝi paŝis tien kun leĝer',  
Ne saltis guto al la ter'.

Leĝere, tamen firme li  
Sur juna rajd-ĉevalo sidis,  
Per fajna gesto li ĝin bridis  
Kaj treme staris tiu ĉi.

Sed kiam la pokalon li  
Transpreni volis de l' knabino,  
Ekvibris ili ambaŭ tre  
Kaj mano trovis manon ne,  
Ne povis teni tiun ĉi,  
Kaj sur la grundon fluis vino.

*Traduko de la Germana poemo "Die Beiden" de HUGO VON HOFMANNSTHAL (\*1874-02-01 – †1929-07.15)  
en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (\*1938-11-04) en 2008-06-02.*

*MR-467-1 / Arg-474-915 (2008-06-03 08:08:17)*

*Mi, Manfred Retzlaff, trovis la originan germanan version de tiu ĉi poemo en la revuo "Natur und Medizin" 03/2008, sur paĝo 18. Ĝi aperis presite ankaŭ en la libro "Deutsche Gedichte", eldonita de la iama germana federacia prezidanto Karl Carstens.*